

**Universitata laborgrupo de ILEI/ESF:  
Mallongaj notoj el la zoom-kunveno, 2019-09-05  
kun raporto pri posta realigado**

**1. Trovado de universitatoj-eperantistoj; instigi ilin fari kursojn**

\* *RC sendos tekston al IPR - alvokon tra ILEI (ankaŭ KK Edukado.net; Landaj listoj(instruistoj)' guglaj grupoj' tvitero; Karin tra Tejo-kanaloj.*

RC sendis la tekston, ĝi aperis en IPR kaj RC sendis ĝin al kelkaj listoj de instruistoj ĉe yahoo kaj google. Nenio cetera estas konata

\* *Instigu registradon de kursoj en Edukado.net, kaj ankaŭ UEA*

En la alvoko estas alineo pri instigo al registrado de kursoj ĉe edukado.net.

\* *RC sendu al KK retadresojn de la listoj de UEA kiujn prizorgas nia grupo: tiuj listoj estas la plej kompletaj*

RC sendis.

**2. Internaciigi universitatojn (projektoj de Viko)**

\* *Afriko kaj Esperanto - bone paŝas; pli kaj pli da universitatoj en Afriko volas partopreni en la projektoj de Viko.*

Nenio plia konata.

\* *Projekto pri Amo - Viko momente metas energion en afrikaj projektoj - paŝon post paŝo.*

La situacio restis senŝanĝa.

\* *Open Journal Systems - ni starigu subgrupon, Viko kaj Radojica sin proponis; esploros kaj poste raportos.*

Viko kaj Radojica iom esploris, sed pliaj esploroj estas bezonataj.

**3. Trovi esplorantojn kaj esplorojn subtenindajn**

\* *Instigi specifajn esplorprojektojn.*

Nenio konkreta ĝis nun.

**4. Konferencoj aranĝitaj de ni (Nitobe, Ilei, Esperantologia) kaj konferencoj aranĝitaj de aliaj por kiuj ni serĉu partoprenantajn esperantistojn**

\* *Konferencoj: ILEI-simpozio en Kebekurbo, temo: Interlingvistiko en universitatoj. Ni subtenu kontinuecon de tiu laboro. Praktika afero: interesi ne-E-univ-oj akcepti partpreni / eventojn. Adapti ILEI al la postuloj de la E-ista kaj ne-E-ista mondoj.*

*Bezonatas nova prizorganto por la kongreso de ILEI (Radojica ne plu faros). Ĉu eblas dividi la taskojn de la estraro de ILEI?*

*Ĉu ni povas trovi homon specifan pro la simpozio, iu kiu respondecas pri Interlingvistiko?*

Fernando Pita estis trovita, sed intertempe la situacio de la kunvenoj ĉirkaŭ la UK kaj la ILEI-konferenco ŝanĝiĝis kaj ni devas infomriĝi pri la nuna stato.

## 5. Lernolibro por universitataj kursoj

- \* *Kursoj: estas bezonata kurso je universitata nivelo*
- \* *3-hora enkonduka kurson pri Esperanto de Feliks Lobo ĉe UNED??*
- \* *Kurso de Wim Jansen en la nederlanda - Edukado.net - ni traduku?(Informoj pri la nederlandlingva libro de Wim Jansen estas ĉi tie: <https://edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=71>. La enhavtabelo en Esperanto elsuteblas ĉi tie: <https://edukado.net/biblioteko/libroj?iid=21594>.)*
- \* *Vera Brandaskova-Frank: Ni demandu kiel statas ŝia libro. En E-o? Tro ampleksa?*
- \* *Materialo de RITE - Edukado.net*
- \* *Frank, Gudskov ('Epitomo de esperantologio'), Gobbo, Goodall (pri fikciaj lingvoj)*

Nenio estis farita. Renato elŝutos kaj ekzamenos la kurson de Wim Jansen.

- \* *Ivan proponas simpozion pri Interlingvistiko kaj Esperantologio en sia universitato en Sud Ameriko.*

La kurso verŝajne jam okazis, Oni devas peti Ivan pri raporto.

## 6. Katalin, Edukado.net: formularo por registrado de universitataj kursoj

- \* *Edukado.net havos novan sekcion pri universitataj kursoj - KK preparas novan formularon; ĝi ne estu tro komplika; ĝi estu tia kian ni bezonas. Ni bezonas detalan enketon.*

KK kreis la novan formularon kaj proponis ĝin por testado, ricevis kelkajn rimarkojn, modifis la komencan proponon laŭ la ricevitaj rimarkoj kaj estis petita de RC enkonduki la formularon en la uzadon.

- \* *Pri registrado de kursoj ĉe [www.edukado.net](http://www.edukado.net) Viko demandis: "kial homoj ne registras sin?" kaj proponis, ke ni starigu neformalan eksperimenton - demandaron ĉe guglo*

Tio ne okazis.